

# BULTENO de REU

№ 86, Oktobro 2016

**Alvoko al la kluboj kaj individuoj**

**Karaj ĉiuj, ankoraŭ ne malfruas pagi viajn tre modestajn kotizojn al REU.**

*Via Estraro*

*Eventoj*

## Krimeaj Esperanto-Tagoj aŭ

### Krimeo – Edena Tero

Mi kiel partopreninto de la somera esperanta tendaro en Jalto volus prezenti ĝin per okuloj de novulo. Des pli mi longe revis viziti Krimeon, kaj Esperanto helpis min realigi mian revon.



#### 1. Ideo

La iniciatinto de la tendaro estis teamo de la Jalta Esperanta Centro kun ĝia ĉefo Jefim Semenoviĉ Zajdman - tre bonkora, energia kaj entuziasma persono. Li havas sperton pri organizo de tiaj aranĝoj: kelkfoje li pasigis t.n. "Veluran sezonon", sed unuafoje - Krimeajn Esperanto-Tagojn ekde la 12a ĝis la 20a de julio. Partoprenintoj estis ĉirkaŭ tridek

homoj el 10 urboj de Rusio (Jalto, Moskvo, Krasnojarsko, Volgogrado, Tomsko, Soĉi, Dimitrovgrad, Ivanovo, Rostov-Don, Liskovo) kaj 4 kromaj landoj (Germanio, Usono, Belgio, Kanado).

#### 2. Vojo

Multaj gastoj preferis atingi la celon per aviadilo, sed mi elektis komplikan vojon: trajno + pramo + 2 busoj (t.n. unueca bileto Moskvo - Jalto). Malgraŭ longa dudiurna vojo mi ne bedaŭris, ĉar dum veturo observis kaj fotis belaspektajn stepajn regionojn, fekundan Krasnodaran provincon, Kerĉan trafluejon, ebenaĵojn de orienta Krimeo kaj ĝian montaran sudan bordon. Dum rea vojo mi sukcesis viziti Anapon kun ĝiaj vidindaĵoj, do ekvidis multe pli, ol la "flugantoj".

### 3. Kondiĉoj

La renkontiĝo pasis en orienta, plej alta, sed fora de maro distrikto de la urbo - Massandra (tamen la centro estis facile atingebla per busetoj). La gastoj estis loĝigitaj en miaopinie komfortaj 2-4-litaj ĉambroj de studenta komunloĝejo kontraŭ tre modera sumo. Ĉiuj programeroj krom solenaj starto kaj fino pasis en ejo de la sama konstruaĵo. Manĝi oni povis memstare au laŭ antaŭmendoj, kies pripago enigis amuzan ĉiutagan tumulton, sed ĉiuj nek mortis pro malsato, nek maldikiĝis.

Partoprenintoj de KET rajtis veni antaŭ kelkaj tagoj, sed aliaj alvenadis dum la unua tago, do ni finatendis ĉiujn. La tendaro danke al la partoprenantoj el la rusiaj urboj kaj la eksterlandaj gastoj rezultigis vere internacia. Jefim Zajzman afable renkontis la partoprenantojn kaj premiis ilin per memoraĵoj kun simboloj de KET. Baldaŭ inter ni instaligis amikeca kaj senĝena etoso.



### 4. Ekskursoj

La mastroj preparis por ni ses tagajn ekskursojn al la plej vizitindaj lokoj de la Krimea suda bordo.

La unuan konatigon kun la urbo gvidis Jefim, kiu montris al ni novigitan kajon kun apudaj stratetoj. Mi kun miro eksciis, ki ĉi tie vivis pioniroj de rusa Esperanto-movado Ostrovskij (persona kuracisto de Ĉeĥov) kaj Borovko. La ĉiĉerono montris al ni sian montoturisman klubon, kiu inkludis ankaŭ lokajn esperantistojn. Ĉemara parto de Jalto plenas da ornamitaj konstruaĵoj kaj monumentoj, ligitaj kun famaj urbaj gastoj kaj loĝantoj.

Entute Jalto, situanta sur tri montetoj kaj ĉirkaŭita per monta muro, kun ties krutaj kaj kurbaj stratetoj, diversstilaj dometoj kaj abundaj kreskoj havas belan aspekton. Ĝi havas longan historion: ekde fondo de loĝloko de pragrekaj navigistoj antaŭ

Kristnasko ĝis ĝia transformiĝo al urbo meze de la 19a jc., kiam ĝi iĝis populara ripozejo.

Jalto estas konata inter la aliaj sudbordaj urboj pro siaj luksaj palacoj, konstruitaj por la rusaj imperiestroj. Ni vizitis tri el ili: Livadian (loko de la fama Krimea konferenco en la 1945), Massandran kaj Voroncovan. Ili distingiĝas laŭ arkitektaj stiloj kaj internaĵoj kaj havas apudajn vizitindajn parkojn kun lokaj arboj (krimeaj pinoj, platanoj, cipresoj kaj aliaj) kaj floroj.

La plej longa kaj informplena rezultigis vojaĝo laŭ la Sudborda ŝoseo al Balaklavo kaj Sebastopolo – la urboj de militgloro de Rusio. Tio rilatas ne nur al ilia heroa rezisto dum la Granda patrolanda milito, sed ankaŭ al kelkaj atakoj kontraŭ ili dum la rusiaj-turkiaj militoj en la 19a jc. Verdire, tiama angla invado kontribuis transformon de la ambaŭ loĝlokoj al la fortikaj urboj kaj elvokis evoluon de la rusa nigramara ŝiparo. Ni sukcesis observi nur centron de Sebastopolo: Malaĥovan monteton, Grafan kajon, Sudan havenon. Tamen la vojo tien-reen estas admirinda pro maraj kaj montaj pejzaĝoj.

Krom tiuj proponitaj ekskursoj la plej aktivaj el ni vizitis ankaŭ Bahĉisarajon kun la apuda mezepoka «kaverna urbo» Ĉufut-Kale, Massandran vinfabrikon (kun gustumado), Nikitan botanikan ĝardenon (kun kolekto de 2000 lokaj kaj ekzotikaj kreskoj). La plej impresaj por mi estis piedira leviĝo sur la montpinton Aj-Petri (1234 m!) kaj promeno laŭ la t.n. Botkina pado en montoj super Jalto. Eĉ unu tagon ni ne pasigis en la loĝejo: iuj kuris al la urbaj plaĝoj, la aliaj promenis tra la urbo. Interalie, dezirintoj havis eblon veni antaŭ KET au resti post ĝi dum kelkaj tagoj.

## 5. Aranĝoj

Ĉiuvespere ni partoprenis en la "multaktivaj" programeroj, sen kalkuli solenan malfermon-fermon, kiujn gvidis Jefim. Mi listigas:

1) en kadroj de la Somera universitato estis prezentitaj prelegoj de Jefim Zajdman pri la Lingvaj festivaloj kaj konkursoj de duoblaj tradukoj en Jalto, pri interreta lernado de Esperanto (grupo "Kurso de Esperanto dum 8 lecionoj" en socireto VK); rakonto de Tatjana Loskutova el Ivanovo pri alilandaj vojaĝoj por la neesperantista publiko (anoj de la klubo de liberaj vojaĝoj «N. Borovko») en la urba biblioteko; skizo pri la lingva situacio en Kvebeko, prezentita de la kanada gasto el Toronto Jed Meltzer; prelego de Rustam Karapetjan el Krasnojarsko pri porinfana literaturo kaj ĝia kreado; rakonto de Aleksej Nistratov pri la vojaĝo al la Soloveck-insuloj;

2) koncertoj de Mikaelo Povorin, Paulo Moĵaev kaj Aleksandro Ĥrustaljov kun konataj (de ĉiuj kantataj) kaj novaj esperantaj kantoj;

3) komuna koncerto, en kiu sin prezentis Evelina Sokolova el Krasnojarsko kaj la improvizita grupo kun la teatraĵetoj;

3) ruslingva koncerto de la membroj de la Jalta barda klubo;

4) poezia vespero, kie Ludmila Novikova kun helpo de kelkaj samideanoj prezentis siajn malnovajn kaj novajn originalajn kaj tradukitajn poemojn kaj kantojn;

5) fabeloj ĉe samovaro, rakontitaj de la gastema Anĵela Belenko;

6) kvizo pri sinsekva traduko gvide de Vladimir Minin (venkis tri moskvanoj : Mikaelo Povorin, Aleksej Nistratov kaj Aleksandr Levedev);

7) rondaj tabloj: «Monda situacio» (gvidis Eric Rademaĉer el Germanio) kaj «Strategio de Esperanto-movado en Rusio» (gvidis Mikaelo Ĉertilov);

8) komuna celebrego de naskiĝtagoj, vortludoj ktp.

La renkontiĝo finiĝis per gaja festeno kaj teumado ĝis nokto. Ĉiuj partoprenintoj ricevis agrablajn memoraĵojn, interesitoj interŝanĝis kontaktojn. La mastro anoncis pri daŭrigo de similaj renkontiĝoj maje kaj septembre anstataŭ julio.

## 6. Resumoj

La Krimeaj Esperanto-tagoj rezultigis vere diversflanka, saturita kaj internacia aranĝo. Ĉe mi ĝi lasis aron da impresoj, scioj, malkovroj, emocioj... Mi kontentas pri mia unua Esperanta tendaro kaj esprimas koran dankegon al ĝiaj organizintoj, unuavice al Jefim Zajdam, Anĵela Belenko kaj Svetlana Smetanina!

*Aleksej Nistratov*

## LA NOVA PONTO

Mi ne skribu detale pri ĉiu programero de la Krimeaj Esperanto-Tagoj, kiujn mi kun granda entuziasmo partoprenis en julio ĉi-jara – oni jam sufiĉe raportis pri tio. Mi deziras nun transdoni miajn personajn impresojn pri la vojaĝo.

### Senŝanĝa Jefim

Estis li, kiu gvidis min kaj aliajn KET-anojn tra Krimeo - ege estimata kaj amata Jefim Zajdman, motoro de nia aranĝo. Mi konas lin ekde la 1970-aj jaroj, do fakte tiom longe, kiom mi okupiĝas pri Esperanto. Komence li allogis min per sia traduko al Esperanto de la usona muzikalo «Jesuo Kristo superstelo», kun kiu mi la unuan fojon konatiĝis ĝuste dank' al tiu brila traduko. Mi poste longe kantetadis ties belegajn melodiojn.

Duan fojon mi revidis lin en Krimeo meze de la 1980-aj jaroj, kiam mi kune kun la grupo de moskvaj esperantistoj partoprenis en la fama «Velura Sezono», kiun Jefim lanĉis en 1979 kaj organizadis ĉiujare ĝis la 2005-a jaro. Kaj jen okazis mia nova renkontiĝo kun li. Li estis la unua, kiun mi ekvidis en Jalto, elirinte el la trolebuso. Mi tuje komprenis, ke li tute ne ŝanĝiĝis – fizike kaj spirite – malgraŭ lia estiminda aĝo. Jefim kaptis mian pezan valizon kaj vikle ekkuris kun ĝi supren laŭ deklivo de la monto direkte al la studenta komunloĝejo, kie estis dislokataj la partoprenantoj de KET. Mi ekhontinte pro la fakto, ke pro mi estas ŝarĝita malpli juna homo, penis repreni mian bagaĝon, sed senrezulte, ĉar mi ne sukcesis kuratingi lin. «Kia neelĉerpebla fontano da energio kaj forto!» – admire ekmiris mi.

Jes, li ĉiam restas tia – plenplena da ideoj, agoplanoj, fantaziaĵoj. «Vi ĉiuj sidas en viaj urboj kaj nenion faras por Esperanto! – grumblis li. – Necesas ja gvidi kursojn por komencantoj, organizadi lingvajn festivalojn kaj aliajn aranĝojn por la vasta publiko». Poste, sidante en la komunloĝejo, mi kun granda intereso aŭskultis lian rakonton pri la eventoj en Krimeo post la «majdana revolucio» en Kievo. «Ĉio, kion montradis la Moskva televido, estas vero, - asertis li. – Ni, krimeanoj, post la «majdano» estis ege timigitaj kaj indignitaj. Komence, la parlamento de Ukrainio akceptis decidon pri malpermeso de la rusa lingvo en la lando, poste la revenintaj el Kievo partoprenantoj de la «antimajdano» detale rakontis pri ĉiuj teruraĵoj, kiujn faradis la ukrainaj «banderlogoj»<sup>1</sup>. La jaltanoj sen ajnaj ordonoj organizis deĵoradon ĉe la monumento de Lenin sur la Ĉemara bulvarado por eviti vican «Lenin-faladon», kiu surfalis la aliajn distriktojn de Ukrainio. Ne pro tio, ke ni tiom ŝatas Leninon, sed pro tio, ke ni, krimeanoj, mem decidis, kio okazu sur nia tero! Krom la ukrainaj nazioj nin minacis la lokaj tataraj naciismuloj... Kiam

okazis referendumo pri aliĝo al la Rusia Federacio, la krimeanoj amase voĉdonadis kaj ĝojegis, kiam sur la granda stacidoma horloĝo en Simferopolo la montriloj estis agorditaj al la moskva tempo!».

Jen li estas tia, iama soveta disidentulo kaj nuna granda rusia patrioto. Li ne timas minacojn de la nunaj ukrainaj nazioj, same kiel iam ne timis «avertojn» de la ŝtatsekurecaj servoj. Li «revenis hejmen» kaj li pravus!

### Massandro

Tian nomon havas distrikto de Jalto, kie okazis KET. Ĝi situas sur deklivoj de la monto, kaj nia komunloĝejo kronis pinton de tiu monto. Dum la unuaj tagoj ni scivoleme piedmarŝadis suben-supren, esplorante la pitoreskajn ĉirkaŭaĵojn, poste preferadis uzi aŭtobusojn por viziti centron de la urbo kaj la urbajn plaĝojn. La belegaj pejzaĝoj de Massandro ravis nin. Tuj apud la komunloĝejo ni trovis la faman vinan fabrikon «Massandro», kie ni certe kun plezuro ekskursadis, gustumante ties vinspecojn kaj aĉetante la plaĉajn por porti hejmen.

### La «civitanoj de l' verda respubliko»

Nia Verda Respubliko ĉi foje ne estis multnombra. Multaj eksterlandaj kaj eĉ rusiaj «samideanoj» ignoris la aranĝon. Sed tiuj, kiuj subtenis ĝin, estis rimarkindaj kiel veraj perloj. Mi ĝuis vidi ilin: kaj la malnovajn geamikojn kaj la novajn por mi vizaĝojn.

En tiu ĉi trezorejo krom la ĉefa «brilanto» Jefim Zajdaman ne eblus malatenti liajn ĉefajn organizohelpantinojn Svetlana Smetanina kaj Anĵela Belenko; niajn glorajn bardojn Mikaelo Povorin, Aleksandro Ĥrustalĵov, Paŭlo Mojajev; famajn veteranojn de nialanda E-movado Mikaelo Ĉtilov, Vladimiro Bepalov, Boriso Zozulja, Vladimiro Minin, Andreo Grigorjev, Tatjana Loskutova. Dank'al ilia aktiveco okazis ĉefaj programeroj de nia aranĝo: prelegoj, koncertoj, konkursoj. Min kiel gvidanton de la poezia vespero precipe ĝojigis Mikaelo Povorin kaj Paŭlo Mojajev. Mikaelo komponis kortuŝan melodion kaj premiere plenumis la kanton «Krimeo» (poemo de N. Turoverov), kiu reflektis tragikan eventon de la jaro 1920 en la vivo de la poeto – devigan pafmortigon de la lasita ĉevalo dum fornavigo el Jalto. Paŭlo brile plenumis tri kantojn de la fama okcitana bardo *Patric*, kiujn mi iam tradukis al Esperanto kaj kiujn foje plenumis mem Patric. Sed mi devas konstati, ke Paŭlo prezentis la kantojn ne malpli bele, sed eĉ pli certece, ĉar li estis la unua esperantisto, kiu plenumis la kantojn en Esperanto (Patric ne posedas nian lingvon). Ŝajne Paŭlo estis sola el la koncertantoj, kiu ricevis «bravon» de la spektatoroj pro la kanto «Mia bela cikadino».

El la novuloj min ravis miaj junaj samurbanoj Alekseo Nistratov kaj Aleksandro Lebedev, kiuj malgraŭ la unua partopreno en la amasa E-aranĝo ne nur tute vigle parolis esperante, sed eĉ gajnis la konkurson pri la sinsekva traduko, kiun organizis Vladimiro Minin; ili ankaŭ aktive partoprenis en la poezia vespero, deklaminte kelkajn poemojn de la rusaj poetoj. Tre aktiva kaj kreiva grupo el Krasnojarsko ankaŭ altiris ĉies atenton. La ĉarma Evelina Sokolova kun profesia vokalvoĉo grave helpis al mi dum la poezia vespero, bele plenuminte du kantojn en mia traduko; ŝi ankaŭ multe kantis dum la komuna koncerto. Ŝia edzo Rustam Karapetjan prezentis siajn originalajn porinfanajn poemojn kaj la dekjaraĝa filo Jan ĉarme recitis en Esperanto la poemon de D. Ĥarms «Malfeliĉa kato».

Surprizis min pluraj eksterlandanoj, partoprenintaj en KET, precipe la ĉarma juna geedza paro Metzger el Kanado - Jed kaj Debora, kaj belstatura juna viro el Germanio Eric Rademacher. Mi konvinkigis, ke ne ĉiuj okcidentanoj unuanime sekvas kontraŭrusian politikon de siaj registaroj – kelkiuj havas propran sintenon kaj deziras memstare esplori ĉion. Krome, niaj eksterlandaj gastoj grave kontribuis al la aranĝo: Jed prelegis pri la lingva situacio en Kebekio kaj Eric organizis «rondan tablon» por pridiskuti kun ni la aktualan mondan situacion.

Min ravis la familia etoso de nia aranĝo, en kiu mi (verŝajne same kiel ĉiuj aliaj partoprenantoj) ne sentis min perdita kaj neatentata. Ĝi memorigis al mi niajn neforgeseblajn sovetajn junularajn tendarojn, dank'al kiuj mi siatempe iĝis verda esperantistino.

## «La insulo Krimeo»

Tiam titolon havis fama romano de la rusa verkisto-disidento Vasilij Aksjonov, verkita fine de la 1970-aj jaroj. Oni taksas ĝenron de la verko kiel fantasta romano pri Krimeo kun alternativa geografio kaj historio. Kiam mi unuan fojon legis la romanon en la 1990-aj jaroj ĝi ŝajnis al mi enua kaj malagrabla pro la kontraŭsovietia senco. Sed post la aliĝo (aŭ aligo laŭ ies opinio) de Krimeo al Rusio en marto de 2014 la fantaziaĵoj de V. Aksjonov mirigis per sia antaŭvido.

Nun, en somero de 2016, mi konstatis, ke Krimeo efektive transformiĝis el la duoninsulo je veran insulon pro la transporta kaj alispeca blokado flanke de Ukrainio kaj la «civilizita» okcidenta mondo. Mi vidis malplenajn fervojojn, senhomajn stacidomojn, fermitajn «McDonald's»-ojn... Malamikoj de Krimeo, verŝajne, maliceme atendas pluan nombradon de la plagoj kaj malagrablaĵoj, kiujn havas nun la obstinaj krimeanoj. Sed mi ne scias, kion ankoraŭ aldoni. Mi ne vidis senakvan Nord-Krimean kanalejon post kiam Ukrainio baris akvofluadon el sia lando en 2014 kaj estis mirigita, ke en nia Massandra komunloĝejo ĉiudierne estis varma kaj malvarma akvo sen ajnaj problemoj; mi ne spertis kune kun la krimeanoj energoblokadon en novembro 2015, kiam la ukrainaj ekstremistoj eksplodfalis mastojn de elektrokonduktiloj ĉe la limo de Krimeo. Tiam sen elektro restis pli ol du milionoj da krimeanoj en siaj loĝdomoj, lernejoj, laborejoj. La blokado estis venkita dank' al la energoponto «Kubanjo – Krimeo», kiu estis konstruita dum la rekorda duonjara periodo.

Jes, la krimeanoj nun, same kiel ĉiuj aliaj rusianoj, spertas diversajn malfacilaĵojn pro la sankcioj, kiujn inventeme elpensadas la «civilizaciuloj». Sed tiuj homoj en Krimeo, kiuj dum sesdek jaroj strebis reveni al la «patrino Rusio», disde kiu ili estis iam arbitre kaj maljuste apartigitaj, kapablas kun rideto renkontadi la provizorajn malagrablaĵojn. «Mono mankas, sed vi toleru!» – vidas ni ŝercan sloganon sur la vendataj ĉemizoj. Kaj la insulanoj toleras, ĉar ili scias, ke post du jaroj estos finkonstruita la Kerĉa ponto, kiu ligos Krimeon kun la kontinenta parto de Rusio. La transporta blokado ĉesos kaj la vivo nepre pliboniĝos. En la keloj de la Massandra vinfabriko jam kuŝas boteloj kun la novproduktita vino kun la etikedo «Nova Ponto». Ili estos malŝtopitaj post kiam laŭ la ponto veturos la unuaj trajnoj kaj aŭtomobiloj. Kaj la festo venos al la stratoj de Krimeo! Tiam mi revenos al Jalto kaj trinkos la novan vinon por la bonstato de la krimeanoj.

1 banderlogoj (de la hinda *Bandar Log* – «simia popolo») – ruslingva ĵargonisma titolo de la anoj de Organizo de Ukrainaj Naciistoj (Bandera-anoj), aktivaj partoprenantoj de la ŝtata renverso en Ukrainio en 2013. Stepan Bandera – ideologo de la ukraina naciismo, unu el la fondintoj de la Ukraina Ribela Armeo, kiu dum la dua mondmilito kunlaboris kun la hitleraj nazioj, kruele murdante alinacian loĝantaron de Ukrainio, Pollando kaj aliaj landoj.

**Ludmila Novikova**

## **RA-11**

Renkontiĝo de Amikoj - 11 (RA-11) okazis la 22-an - 29-an de julio 2016 en eksa orfejo en vilaĝo Judino apud la ĉefurbo de respubliko Tatarstano Kazan' (Rusio). La aranĝon partoprenis 11 personoj el Kazan', 9 - el Novosibirsk, po 5 el Moskvo, Ĉeboksary kaj Tjumen', 4 - el Tomsk, po 3 - el Krasnojarsk kaj Tiĥvin, 2 - el Glazov (Udmurtio), po 1 - el Nefteĵugansk (Ĥanti-Mansia Aŭtonoma Regiono), Liskovo (regiono de Niĵnij



Novgorod), Barnaul, Jekaterinburg, Parabel' (Tomska regiono) kaj Naberejnye Ĉelny (Tatarstano). Entute - 53 personoj. Ĉiuj - el 15 loĝlokoj de Rusio. La esperantistoj el Kazan' kaj Naberejnye Ĉelny ne loĝis kun ni, sed sporade venadis al la renkontiĝo. La aranĝon organizis esperantistino kaj membro de REU-komisiono pri la regiona agado el Novosibirsk Katerina Arbekova kaj aliaj novosibirskaj esperantistoj. Grandan dankon al ili!

En la programo okazis ekskursoj en urbo Kazan' kun vizitado de multaj vidindaĵoj (inkluzive vizitojn al la iama strato de Esperanto) kaj kun gustumadoj de naciaj tataraj pladoj. Mi eĉ fotiĝis apud policejo "Esperanto" en tiu strato. Okazis ankaŭ ekskursoj al vidindaĵoj ĉirkaŭ urbo Kazan': al monaĥejoj, diversaj belaj konstruaĵoj kaj antikvaj loĝlokoj, turistaj piedmarŝoj kun naĝado en Smeralda kaj Cigna lagoj kaj sunbruniĝado. Okazis ankaŭ ekskurso laŭ rivero Volgo per ŝipo.

En la kleriga programo okazis E-kursoj (konversaciaj rondoj) por komencantoj (gvidis Konstantin Obrazcov el Tomsk) kaj por progresantoj (gvidis Irina Gonĉarova el Moskvo). Okazis ankaŭ prezentadoj de E-teatraĵetoj, vespero de E-poezio, en kiu mi prezentis miajn tradukojn en E-on de kantoj de tomska esperantistino kaj kantistino Tatjana Vinogradova. Aleksandr Blinov el Ĉeboksary prelegis pri "Kiel lerni lingvojn". Okazis spektado de video- kaj kinofilmoj en E-o, E-kvizoj, ludoj, konkursoj, metiejoj (produktado de artefaritaj floroj ktp), surtablaj ludoj (inkluzive preferancon) ĝis malfrua vespero.

Okazis interpretista konkurso el E-o en la rusan lingvon inter 9 partoprenantoj. La ĉampiono de Rusio iĝis Aleksandr Belov el Tiĥvin (Leningrada regiono). La 2-an lokon okupis Katerina Arbekova el Novosibirsk. La trian - Viktor Gromov el Kazan'. La laŭdan mencion ricevis Jelena Ŝaravina el Krasnojarsk. Bonajn ŝancojn por okupi la unuan lokon havis 11-jara miraklinfano Petro Fedosov el Moskvo, sed post la unua etapo Irina Gonĉarova subite eltiris lin el la konkurso kaj forveturigis al Moskvo (ĉu eble pro envio al li?). La konkurson aranĝis kaj gvidis Vladimir Minin (Tomsk).

Ĉiuvespere okazadis gajaj programoj. La 26-an de julio okazis festado de la 129-a naskiĝtago de Esperanto.

Foj-foje venadis ĵurnalistoj el urba interretgazeto "Inde". Ili fotadis kaj intervjuadis partoprenantojn de RA-11. Meze de aŭgusto en la retejo de "Inde" aperis grandaj artikoloj pri RA-11 kaj pri la eksa strato de Esperanto. En la artikolo pri RA-11 aperis grandaj intervjuoj kun la prezidanto de Kazana E-Klubo Ildar Kijamov, kun la prezidanto de Tomska E-Klubo Konstantin Obrazcov kaj kun la komisiito de REU pri la regiona agado Vladimir Minin.

Enkadre de RA-11 okazis ankaŭ la transdono de la letero, kiu estis akceptita de esperantistoj de 6 landoj en "Krimeaj Esperanto-Tagoj" en Jalta (Krimeo, 12-20.07.2016) al la urbestro de Kazan' kaj al la prezidento de Tatarstano pri alinomigo de la eksa strato de Esperanto je strato de Nazarbajev. Detale mi skribis/skribos pri tio kaj pri la artikoloj en "Inde" en miaj aliaj leteroj.

*Vladimir MININ,*

*REU-komisiito pri la regiona agado*

## **Rakonto pri RA -11**

Dum somera ripozo mi sukcesis dum kelkaj tagoj partopreni RA-11 kaj volas mallonge rakonti pri ĝi, des pli ke mi vidas, ke ĝis nun nenie aperis iu raporto pri ĝi.

Vi ĉiuj certe scias, ke RA "Renkontiĝo de Amikoj" estas tradicia somera aranĝo, kiun organizas Katerina Arbekova kaj membroj de Novosibirska Esperanto-klubo. Plejparte RA estas turisma aranĝo, sed ne nur kaj havas ankaŭ ne tre streĉan Esperanto-programon: konversaciajn rondojn por komencantoj kaj progresantoj, distran, sportan- kaj ludan programojn. Multaj el RA okazis en tre belaj



naturaj lokoj, ĉel a fama lago Bajkal, apud la maro en Krimeo, en montara altaja regiono k.t.p. Mi mem partoprenis du el tiuj, kiuj pasis apud Bajkal kaj estis impresita de bela naturo, en kiu ni vivis kaj ripozis.

Sed ĉi-foje kiel loko de la aranĝo estis elektita Kazanj - ĉefurbo de la aŭtonomia tataara respubliko, granda urbo, pri kiu mi aŭdis multajn laŭdajn vortojn de vizitintoj ĝin kaj tial ankaŭ volis iam vidi ĝin.

Do, RA-11 pasis en la bazejo, situanta tre proksime de Kazanj, la 22-n – 29-n de julio. Krom la diverslokaj partoprenintoj el 13 urboj de Rusio, kiuj loĝis en la bazejo, estis ankaŭ 11 esperantistoj el Kazanj, 5 el la urbo Ĉeboksari kaj unu el Naberejnie Ĉelni, kiuj partoprenis kiel gastoj dum nur kelkaj horoj aŭ dum kelkaj vesperoj, aŭ eĉ diurnon, kaj se kalkuli ĉiujn, entute estis 52 partoprenintoj.

Antaŭtagmanĝa duono de la tagoj estis disponigita por riĉa ekskursiva programo tra la urbo kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj kaj preskaŭ ĉiutage ni povis ien ekskursi. Krom kelkhora busa interesa ekskurso tra la historia Kazanj kun profesia ruslingva ĉiĉeronino, ni ankaŭ povis plezure piedekskursi tra la urbocentro en la kompanio de afablaj kazanaj esperantistoj Dmitrij Koŝelev kaj Ildar Kijamov, kiuj akompanis nin dum sia ripoztago kaj rakontis pri la urbo en Esperanto. En tiu tago nia grupo eĉ tagmanĝis ne en la bazeja manĝejo, sed gustumis bongustajn naciajn tatarajn pladojn en la agrabla kafejo “Domo de Teo”. Ekskurson al la urbo Svijaĵsk sur la insulo mi ne partoprenis, sed partoprenis la duhoran vesperan ŝipekskurson laŭ la rivero Volga kaj vere ĝuis ĝian trankvilan, romantikan etoson, belajn pejzaĝojn kaj sunsubiron.

Post la tagmanĝo ĉiutage okazis “KoRoĵ” (Konversacioj Rondoĵ), kiujn gvidis: por komencantoj –Konstantin Obracov kaj por progresantoj – Irina Gonĉarova, kaj mi mem kelkfoje aliĝis al ŝia grupo. Semajnfine, por unu diurno, la aranĝon vizitis ĉeboksaranoj, kiuj venis per propraj aŭtoj, kaj ni ĉiuj tre ĝojis renkontiĝi kun ili. Aleksandr Blinov sukcese kontribuis por la programo de RA-11, preleginte pri la temo “Kiel lerni lingvojn”. Mi mem preparis por la programo du prezentadojn, sed realigis nur unu el ili, pri la 101-a UK en Slovakio, kiu ĝuste en tiuj tagoj okazis en la kongresa urbo Nitra, krome mi montris ankaŭ videon pri la centro de Peter Balázs en Partizanske kaj ĝiaj aktivaj junuloj-volontuloj. En unu el la tagoj okazis diversaj metiejoj, kiujn lerte gvidis novosibirskaninoj kaj ĉiuj ceteraj elektis laŭplaĉe, kiun el ili partopreni.

Ĉiuvespere okazis gajaj distraj programeroj, konkursoj, ludoj. Al mi aparte plaĉis poezia kaj teatra vesperoj, ambaŭ sub la gvido de Irina Gonĉarova, kiu ne nur elektis kaj preparis bezonatajn por ili materialojn kaj tekstojn, sed sukcesis inspiri kaj altiri multajn RA–anojn partopreni tiujn du vesperojn. Interese pasis ankaŭ kvizo pri delfenoj kaj balenoj, preparita de Katerina Arbekova kaj okazigita la 26-n de julio, en la internacia tago de delfenoj.

Bedaŭrinde, mi ne povis partopreni RA-11 plenperiode kaj devis forveturi je du tagoj pli frue, tial mi certe rakontas ne pri la tuta programo, sed esperas, ke iu faros aldonadojn.

Mi dankas al RA-11, ke ĝi donacis al mi agrablajn renkontiĝojn kun multaj miaj malnovaj amikoj – esperantistoj: Irina Gonĉarova el Odincovo kaj Maksim Ĵitĉenko el Moskvo, Tatjana kaj Aleksandr Belov el Tiĥvin, Julija kaj Aleksandr Blinov kaj Elena Nadikova el Ĉeboksari, Roman Jefremov kun la filino Sonja el Glazov, kun la familio de Koĉjo Obracov el Tomsk; Katerina Arbekova kun la filino Daŝa kaj Irina Ĵuravleva el Novosibirsk, Elvira Insapova el Nefteĵugansk, Nadeĵda Borisova kaj la familio de Paŝa Veselov el Tĵumenj!

Mi tre ĝojis konatiĝi dum RA-11 kun juna, dekunujara moskva esperantisto Fedosov Pjotr (kromnomo Aspiranto), kiu vere impresis min per sia saĝo, juna energio, brila posedo de Esperanto, aktivado dum la aranĝo! Mia esperantista koro restas trankvila kaj kontenta ĝis kiam en Esperantujo aperas tiuj knaboj, kiuj memstare lernas la lingvon kaj scipovas libere paroli ĝin! Kaj certe mi dankas RA-11 por la ebleco de konatiĝo kun la ĉefurbo de Tatario, alloga urbo Kazanj!

*Raja Kudrjavceva*





## MER-6

9-11 sept 2016 en ripozejo “Salut” apud urbo Puškina (Moskva regiono) okazis la 6-a Moskva Esperanto-Renkontiĝo. Partoprenis 30 personoj: 1 el Latvio, ĉiuj ceteraj el Rusio; estis reprezentitaj Moskvo, Ivanovo, Niĵnij Novgorod, Brjansk, Sankt-Peterburg, Riga k/aŭ ties regionoj.

La intenco revivigi etoson de iamaj Centrorusiaj E-renkontiĝoj plene sukcesis. Agrablan nuancon al la etoso aldonis kelkaj

lokaj katoj, unu el kiuj tuj aliĝis al nia kompanio kaj pasigis tutan tempon en nia dometo aŭ apud ĝi, volonte akceptante nutraĵojn kaj karesojn.

Preskaŭ ĉiuj partoprenintoj estis spertaj Esperanto-parolantoj, do ne okazis iaj kursoj. Kelkaj progresantoj diligente strebis paroli en Esperanto kaj tre baldaŭ adaptiĝis al la etoso. Oni aŭskultis prelegojn pri evoluo de Esperanto-ideologio (N.Gudskov), pri problemoj de beletra tradukado (du prelegoj – de V.Melnikov kaj L.Novikova), pri popolaj fabeloj (A.Striganova), pri perspektivoj de libro-eldonado (D.Ŝevĉenko), pri L.Zamenhof kaj A.Postnikov (M.Bronŝtejn), pri K.Gusev (ties filo V.Gusev) k.a. Enkadre de MER estis anoncita scienca konferenco de la Universitato pri Popol-amikeco “Patris Lumumba” – do la prelegoj baldaŭ estos publikigitaj, en la rusa kaj Esperanto, kiel ties materialoj.

En komplika kvizo pri raraj vortoj kaj pri Esperanto-kulturo venkis V.Melnikov – tamen kun li akre konkurencis M.Povorin. Vespere okazis bardaj koncertoj (M.Povorin, M.Bronŝtejn, S.Straŝnenko), arta kafejo, komuna kantado. M.Abramoviĉ preparis bongustegan ŝaŝlikon – tiu malfruvespera aranĝo multe superis iamajn lignofaĵojn, pro kies manko en Rusiaj E-renkontiĝoj delonge suferis spertaj esperantistoj...

Ĉio planita okazis ĝustatempe, eĉ lastmomente aldoniĝis unu plia programero anstataŭ supozita “libera tempo”. La organizantoj – Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova – zorgis pri ĉio vere modele. Ni esperu, ke tia semajnfina eksterurba renkontiĝo iĝos tradicia, samkiel unutagaj renkontiĝoj en la gastama hejmo de Dmitrij kaj Anna.

*Valentin Melnikov*

## Opinio pri MER-6

Komence de septembro en Moskvo estis multe da eventoj: Urbofesto de Moskvo, Internacia milit-teknika forumo "Armeo-2016", malfermo de nova urbtrajna linio "MCR" (Moskva Centra fervojRingo).

Kaj moskvaj esperantistoj Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova organizis esperanto-eventon: Moskva Esperanto-renkontiĝo. Tio estis la sesa renkontiĝo. Ĝi okazis en pitoreska loko apud rivero en Puŝkinskij-distrikto de Moskva Regiono.

Ĉefa temo estis: Esperanto-kulturo.

Antaŭ evento estis preparitaj anoncoj en interreto, en Vizaĝlibreto, solenaj invititleteroj... Oni havis eblecon tralegi "Programon de 6-a Moskva Esperanto-Renkontiĝo" k.t.p. Burokratoj estis kontentaj.

Sed ordinaraj homoj ekplezuris dum renkontiĝo de samideanoj.

En programo estis skribite: "... Kvizo". Sed ni ekvidis brilan ludvesperon. Mikaelo Bronŝtejn preparis



amuzajn demandojn, partoprenantoj lerte respondis. Du favoritoj: Valentin kaj Mikaelo Povorin, rivalis en fino. Venkis Valentin, sed realan ĝojon gajnis ĉiuj.

Kaj poste estis koncerto de Mikaelo Povorin. Ĝi poiomete transiris al komuna kantado malfrue post meznokto.

Dum sekva tago estis seriozaj prelegoj. Seriozeco ne estas enuoco. Oni aŭskultas prelegojn en unu enspiro. En ĉiuj rakontoj estis multe da specialaĵoj.

Organizintoj bone kaj bele faris ilian laboron. Ĉio estis en ordo, ĉio iris laŭ plano ĝustatempe.

Prelegoj estis bonaranĝitaj, manĝpaŭzoj ne donis eblecon laciĝi.

Estis neatenditaj elementoj: dum prelegoj alvenis kato kaj partoprenis en renkontiĝo ĝis fino. En dua nokto akurate meznokte ekkomencis pluvo. Ĉiuj devis kuri al fajro sub tegmento. Ĝi ploris ĝis matenmanĝo.

Esperanto-renkontiĝo tre plaĉis al mi. Tio estis brila tempo por samideanoj.

*Aleksej Kozlov*

## MODELA INTERNACIA ARANĜO

Ekde miaj studentaj jaroj mi tre ŝatas Ĉebaltion, precipe Litovion kaj aparte BETojn, kiujn perfekte organizas nelacigebla Povilas Jegorovas kun sia granda amikecema fidinda teamo.

Ĉi somere la vica BET-52 pasis en ĉarmega pitoreska kuracloko Birŝtonas, ĉe la bordo de la rivero Neman. Oftaj pluvoj kun tuja varma sunapero ĝojigis kaj mirigis nin, ni ja atendis fridan veteron. La pitoreska areo abundis je fontoj kun diversspecaj mineralakvoj. Floraro, antikvaj konstruaĵoj kaj natura arbaro vokis al senĉesa promenado kaj ripozo. Tamen - ne! Ne havis ni eĉ minuton liberan !La partoprenantaro riĉis je karaj vizaĝoj, konataj nomoj, elstaraj prelegantoj, spertaj instruistoj, famaj aktoroj kaj kantistoj. Ĉirkaŭ 300 esperantistoj el 27 landoj ne havis eblecon enui. La programo estis detale kaj skrupule preparita, perfekte aranĝita kaj plenumita. Krom multegaj prelegoj far diverslandaj profesoroj (W.Zelazny, A.Melnikov, G.Silfer kaj aliaj) estis organizitaj lingvaj kursoj en 8 grupoj por dezirantoj ĉiunivelaj. Tion profesie patronis Grazina Opulskiene. Kvankam la programeroj pasis en diversaj partoj, anguloj kaj ejoj de la kuracloko, ĉio estis perfekte preparita kaj aranĝita.

Ne mankis ekskursoj: ŝippromeno ĝis Kaunas, gustumado de medo en unu el antikvaj urbetoj k.a. Ĝuinda estis la plenumado de litova himno, kiam la 6-an de julio je la 21-a horo litovoj en la tuta mondo omaĝas la publikan kantadon al la Tago de la ŝtato (kronigo de la Litovia reĝo Mindaugas). BETanoj aliĝis al ĉi kantado kune kun la urbestrieno de Birŝtonas, kiu gaste venis al BET.

Vesperaj koncertoj estis vere neimagebla plezuro! JoMo, Mikaelo Bronŝtejn, Assorti, Georgo Handzlik kaj Saŝa Polipoviĉ kun la nova spektaklo “La kredito”, Ĵomart kaj Nataŝa, instruista ensemblo “La Nigra Rozo” el Litovio kaj multegaj aliaj, kiujn admiris la publiko kaj donacis al ĉiuj fortajn aplaudojn.

Ne eblas forgesi noktajn programojn, kiuj pro pluvoj okazadis en unu el la domaj prelegsalonoj. Kantoj sonis ĝis maten’, anekdotoj, amika varmega etoso, regaloj, vino, biero, dolĉaĵoj, spritaĵoj. Intermiksiĝis ĉio. Unika estis BET ĉi foje! Ni kantis amatajn kantojn de nia SEJM - epoko, dank al kelkaj spertaj gitaristoj kaj kantemuloj ( Nataŝa Berce, Sergeo Straŝnenko, Mikaelo Bronŝtejn, Mikaelo Lineckiĵ ) la etoso estis preskau ĉelignofajra. Kelkaj nespertuloj miris pri tio, kiel (ekzemple, mi) eblis partopreni ĝis la frua mateno kantadon kaj je la 9-00 jam instrui... Mi mem miras ĝis nun.

Ege interesa, kvankam ne tre bone aranĝita far poloj, estis kvizo pri Esperanto - historio, literaturo, movado. Surprizaj estis premioj, kiuj konsistis ne nur el diplomoj, belaj libroj, sed ankaŭ enhavis kovertojn kun certaj sumoj en euroj. Tre agrable!



Adiauan koncerton tute neatendite por ni ekis per gitarludado kaj kantado de kelkaj popularaj E-kantoj veterano de E-movado Vitautas Ŝilas. Vera donaco !!!

Unuvorte, mi feliĉis en BET, feliĉas nun kaj feliĉos en estonto, venonte al novaj ĉebaltaj aranĝoj. Dankegon, karaj litovoj! Prosperon al la klubo “Juneco”, sanon kaj fortojn al Povilas Jegorovas, kiu faras ĉion profesie! Imitinda modela aranĝo ne nur por BET- organizantoj, sed por multnombraj ontaj eventoj en Esperantujo ĝenerale.

Kaj fine – vera historio el ĉi jara BET, kiu jam cirkulas, kiel anekdoto. Ĉe la ŝildo kun la nomo “Manĝejo” staras du litovoj, ne esperantistoj, kiuj ripozis en la sama bazejo, kaj legas: “mangejo” (sen ĉapelo). Aliras niaj homoj kaj oni demandas, kio ĝi estas. Esperantistoj klarigas, ke tio estas internacia lingvo, ktp, ktp. Tiuj du iom meditas kaj diras: “Bone, ke ni ne estas gejoj”.

*Svetlana Smetanina*

## 49-a ILEI-konferenco

Jam finiĝis somero kaj ni al kutimiĝis dum tiu tempo legi pri diversaj internaciaj aranĝoj, kie esperantistoj denove lernis kaj spertis interkulturecon. Ĉiun-ti numeron ni dediĉas al la ĉefa jara kunveno de ILEI – Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Ja Juna Amiko estas porkomencanta revuo de tiu organizo. Kaj kie komenci sian esperantumadon? Ankaŭ en ILEI-konferenco, kompreneble!

Ĉi-jare ĝi okazis meze de Eŭropo – en Hungario, en tre afabla urbo Nyíregyháza. Ĝi situas en la plej orienta parto de la lando. Nyíregyháza estas unu el 7 la plej grandaj urboj de Hungario. Ĝi estas konata unuavice kiel la fama kuraĉloko. Tie situas banejoj kun minerala saniga akvo.

La loko estis perfekte elektita ankaŭ rilate al la konferenc-kondiĉoj. Je dispono de konferencanoj estis konstruaĝoj de Nyíregyháza universitato – unu el la scio- kaj klerigaj centroj en Hungario. Laŭ la programo oni povis esti aŭ en granda salono aŭ en malgranda klasĉambro. Ĉiuj ejoj estis bone ekipitaj per necesaj teknikaj kaj aliaj bezonaĵoj.

Partoprenis la ĉi-jaran ILEI-konferencon 130 partoprenantoj el 26 landoj el 5 kontinentoj.

La temo de la ĉi-jara 49-a ILEI-konferenco estis “Novaj vojoj de lernado”. Temis ne nur pri

Esperanto-studado, sed ĝenerale pri la eduka proceso. La temo estis elektita ne hazarde. Moderna mondo tute ŝanĝigis la nunan pedagogian situacion. Se antaŭe instruisto ĉiam superis la lernadon kaj lernantojn, hodiaŭ iliaj roloj egaligis. Pere de modernaj teknikaj lerniloj la studentoj ofte facile memstare studas diversajn fakojn. La sukceso de tiuj paĝaroj, ekzemple, por Esperanto – Duolingo aŭ Lernu.net – pruvas ŝanĝojn de la nuna edukado. Krome, graviĝis komunikado ene de la eduka proceso. Do, ILEI kiel organizo de instruantoj devas,



kompreneble, konsideri tion. La temo de la 49-a ILEI-konferenco tute kongruis kun la proklamita flanko de UEA Jaro de la Lernanto – JdL. Ĝi estis lanĉita en Nitra (Slovakio) dum 89-a UK – Universala kongreso de Esperanto – kaj daŭros dum unu jaro ĝis UK-2017 en Seulo (Koreio). Dum tiu Jaro estas planotaj diversaj aranĝoj rilataj al la edukado. La 49-a ILEI-konferenco komencis realigadon de JdL laŭ la propra programo. Dum la konferenco en Nyiregyhaza okazis multaj tre altkvalitaj prelegoj, prezentoj, atelieroj. Oni povis diskuti pri diversaj aspektoj de la eduka proceso, pri rolo de Esperanto en interkultura lernado. La eminentaj prelegintoj prezentis riĉajn kolektojn de instru- kaj kapabli-materialoj, proponis interesajn diversspecajn ekzercojn.

Ĝenerale la programo estis tre riĉa kaj densa, kiel kutime dum la ILEI-kunveno. Ĉiu partopreninto povis elekti iun aŭ alian programeron laŭ propraj deziro kaj intereso. Diversaj aktivajaj plenumis la tutan semajnon. Altnivelajn preleĝojn ŝanĝis interesaj debatoj, seminarioj, diskuttrondoj, cerbumado pri diversaj gravaj temoj. Ĉiu povis proponi proprajn ideojn, vidpunktojn, sciojn por la komuna pripensado kaj pritraktado. Tiuj opinioj tre gravas por ILEI, ĉar donas novajn stimulojn kaj agadirektojn por la Ligo pri instruado kaj kapablo rilate al Esperanto.

Kompreneble, nepris diversnivelaĵoj kursoj pri Esperanto, gviditaj de spertaj kaj lertaj instruistoj. Ilin partoprenis pli ol 60 da konferencanoj, inter ili – pli ol 20 da novuloj. Fine de la kursaro okazis ILEI-ekzameno por partoprenintoj. 25 el ili sukcese trapasis la ekzamenon kaj dum la fermo en solena etoso ricevis siajn diplomojn. Krome, atestilojn ricevis 11 komencantoj, kiuj diligente lernis Esperanton.

Dum la konferenco la partoprenintoj ne nur havis eblecon viziti diversajn kursojn/seminariojn, sed povis studi aŭ perfektigi siajn instru-kapablojn. Okazis kelkaj sukcesaj preleĝoj kaj trejnadoj pri tio, gviditaj pere de profesiaj spertuloj (Zsafia Korody, Mireille Grosjean, Duncan Ĉartes kaj aliaj). Ilin partoprenis multaj (ĝis 48) instuemoj el diversaj mondanguloj. 25 el ili ankaŭ ricevis diplomojn pri instruista trejnado, 5 konferencanoj spertis sin en provlecionoj. Krome, tre valoris, sendube, interŝanĝo de instru-spertoj, kio okazis konstante dum la diversaj programeroj.

Kaj, kompreneble, la konferencanoj malkovris por si mem Hungarion – ĝiajn kulturon, tradiciojn, vivon. Dum la konferenco okazis belegaj koncertoj de la lokaj artistoj kaj grupoj. Ekzemple, per siaj kantoj ĝojigis la partoprenintojn Attila Sĉimmer – fama hungara kantisto. Gajajn hungarajn dancojn, inkluzive, kompreneble, faman ĉardaŝ, prezentis lokaj folkloraj grupoj. Nacia vespero, sendube, restis en la memoro de la konferencanoj kiel la plej signifa impreso ene de la kultura programo. Ne mankis, kompreneble, ekskursoj. La partoprenintoj ne nur konatiĝis kun Nyiregyhaza mem, sed kun ĝiaj bekaj kaj famaj ĉirkaŭaĵoj. Dum la tuttagaj ekskursoj la konferencanoj gustumis lokajn trinkaĵojn kaj eĉ mem produktis ĉokoladon.

Ankaŭ konferencanoj demonstris siajn kapablojn – dum la internacia vespero. Sonis kantoj en diversaj lingvoj, muziko el diversaj mondopartoj, la partoprenintoj ĝuis belegajn naciajn dancojn. Dum unu vespero koreianoj plezurigis la konferencanojn per siaj dancoj, muziko, prezentoj. Ja Koreio gastigos ILEI-kunvenon sekvontjare. Danke al tiu prezento ĉi-jaraj konferencanoj jam povis imagi la etoson de la koreia ILEI-kongreso.

Tradicie okazis lingva festivalo. Por ĝi oni elektis etnografian subĉielan muzeon – Sóstó. Kaj scivolemuloj povis lerni kaj ekzerciĝi en la hungara lingvo, kiu estas unu el la plej malfacilaj lingvoj en la mondo. Sed ja esperantistoj alkitimiĝis superi lingvajn barilojn, ĉu?

Dum ripoztempo, kiu fakte ne multis, la partoprenintoj havis ankaŭ eblon iom sanigi sin en diversaj banejoj kun minerala akvo. La organizantoj zorgis pri rabatoj por la konferencanoj, kio estis aparte tre agrable. Do, Esperanto protektas ne nur pacon kaj interkomprenon, sed ankaŭ la sanon – morale kaj fizike, ĉu?

Fine de la konferenco okazis enketilo pri ĝiaj rezultoj. La partoprenintoj skribis siajn impresojn, rimarkojn, sugestojn, venintajn de iliaj observoj kaj spertoj dum tiu-ĉi aranĝo. Tiuj resonoj, sendube, estas ege valoraj por la sekvontaj jarkunvenoj de ILEI! Ja reago de membroj estas la unua instigo por la Ligo kaj ĝia Estraro. ILEI planas daŭrigi tiun novan iniciaton pri enketado por pli bona realigado de siaj ĉefaj celoj kaj taskoj.

Finiĝis la konferenco per preskaŭ 3-taga densa kaj fruktodona Estrar-kunsido de ILEI, kie oni konkludis la rezultojn de la ĉi-jara kunveno kaj planis sian laboron por la sekvonta tempo.

La ĉi-jara konferenco estis la lasta, ĉar dum la komitat-kunsido de ILEI en Nyireĝaza oni decidis nomŝanĝi venontajn jarkunvenojn la kongresoj de ILEI. Tiu nomo pli kongruas pro abundeco kaj vario de la programo. La sekva ILEI- jam-kongreso okazos en Koreio – lando de UK-2017 en la marborda urbo Busan, la 15-22-an de julio 2017 (rigardu la paĝaron de ILEI

<http://www.ilei.info/> aŭ la facebook-grupon

<https://www.facebook.com/groups/158807324552503/?fref=ts>).

*Elena Nadikova*

## La franca grupo gaste en Tihvin - St-Peterburgo - Moskvo

La lastan semanjon de septembro en Moskvo gatis 7- persona grupo de esperantistoj el Normandio. Antau ol veni Moskven ili kurte vizitis Tihvin-on, kies ĝemelurbo estas u. Herouville. La grupo gatis en St-Peterburgo, ĝuis la vidindaĵojn de la dua ĉefurbo kun helpo de Viktoro Kandalinskij, Svetlana Ejst kaj Valeria Cvetkova. Oni vizitis Ermitaĝon, ŝipumis al Peterhof, admiris la koncerton "Hor Tureckogo". La grupo devintus veni fine de julio, tamen, la tihvinanoj ne povis ĝin akcepti, pro tio la vizito estis transmitita al septembro. Al ni bonŝancis kun vetero, kvankam ne tre varmis, almenau ne estis pluvo. El la grupo nur 2 personoj antaue vizitis Rusion, ĉiuj ceteraj venis la unuan fojon kaj, certe, multo interesis la gastojn.

La grupo vizitis Kremlon, Ruĝan Placon, ambau Arbatojn, Tretjakov-galerion. Estis organizita busa ekskurso tra la urbo, vizito al vespera metroo, tre plaĉis la Katedralo de Kristo-la-Savinto, Moskva Ŝtata Universitato, Parko de Venko.

Unu plena tago estis dediĉita al la tipa rusia urbo centre de la lando kun longa kaj interesa historio Pereslavl-Zalesskij. Ni vizitis miraklan Bluŝtonon, la muzeon "Botik Petra", iom kunpartoprenis la feston de Caro Berendej, promenis tra la fama Dendrologia ĝardeno. Tre interesa evidentiĝis por niaj gastoj Muzeo de Ruzaĵoj, kie oni kaj ridegis kaj fajfis (pro miro), palpis la eksponaĵojn, fotis.

Omaĝe al la Tago de turismo, kiu estis precize ĉivizite, en la loka restoracio oni regalis per vodko, kio tre plaĉis al gastoj, iom frostiĝintaj en la venta vetero ĉe Pleŝĉeevo-lago.

En Esperanto-klubo "Lev Tolstoj" onin plezurigis per la koncerteto Miĉjo Povorin. Francoj kantis siajn ŝatatajn kantojn, ni kantis kune en Esperanto, babilis, manĝis, trinkis, interŝanĝis impresojn kaj opiniojn pri nialandaj kulturoj kaj historioj.

En la grupo vojaĝis kuraĝa handikapulo en ĉaro. Por ni tio estis nova sperto, malfacila, peniga, iom laciga. Sed admirinda! Mi rompadis la kapon, kiam Mikaelo Bronŝtejn komunikis al mi pri tio. Kion ni faru kun li en metroo, en muzeoj, en... en...? Neniam Jean-Marie (lia nomo) plendis, ĉiam havis bonhumoron, enviindan sintenon. La grupo helpadis, neniam li sentis sin izolita, lasita, forgesita. Bedaurinde, nek nia lando (precipe laborantoj en muzeoj), nek ĉirkaŭaj homoj estas pretaj kunvivi kaj kunagi kun similaj homoj.

La grupo forflugis, apenau tenante larmojn en okuloj, tiom kortuŝa estis la unusemajna restado... Plaĉis ĉio: Moskvo, senpluva vetero, barĉo, sinceraj helpemaj homoj, akcepto.

Lige kun tio mi esprimas apartan dankegon pro sindona, fervora, ĉiutaga helpo al Dmitrij Osipov! Koran dankon al helpantoj lingve, fizike, morale: Aleksej Kozlov, Aleksandr Milner, Galina Lenskaja, Ludmila Novikova. Dankon, karaj amikoj!



*Svetlana Smetanina,*  
*organizanto de la vizito*

## Korea karavano en Rusio

Fama sud-korea esperantisto prof. So gilsu (ĉi-jare li fariĝis honora membro de UEA) organizis trajnan vojaĝon de 10 samideanoj el Seulo al 101-a UK en Nitra, kaj poste – tra pluraj landoj de la Centra Eŭropo. Survoje li haltis en diversaj urboj, kie lokaj esperantistoj multe helpis al la grupo konatiĝi kun la koncernaj urboj: mendis hotelojn, manĝojn, gvidis ekskursojn – ktp, ktp. Kompreneble, granda parto de la vojo estis en Rusio, kaj la grupo haltis en Irkutsko, Novosibirsko, Jekaterinburgo kaj Moskvo, kie ĝi estis 16-17.07. Dank’ al prepara laboro de Svetlana Smetanina, ni (t.e., mi, Timur Kuliev, Aleksej Kozlov kaj Anna Striganova) sukcesis kontentigi ĉiujn dezirojn de la koreaj s-anoj – gvidis kaj tradukis ekskursojn, montris vidindajn lokojn en Moskvo, trovis koreajn restoraciojn... La vizito de tiaspeca trajnkaravano al Rusio ne estas lasta – sekvontjare s-ro So planas ion similan el Eŭropo al la 102-a UK en Seulo.



*Nikolao Gudskov*

## Premiitaj estraranoj

26 de julio 2016 enkadre de UK-101 en Nitro estis anoncitaj la rezultoj de Belartaj Konkursoj de UEA. En la poezia branĉo la trian premion ricevis Aleksandro Mitin, pro "Agemaj homoj kuras al sukceso". Honoran mencion ricevis Valentin Melnikov pro "Ironiaj hajkoj". Ĉi-jare la poezian konkurson partoprenis 39 verkoj de 18 aŭtoroj el 15 landoj.

Dum la Scienca Forumo, kiu okazis kadre de la 101-a Universala Kongreso de Esperanto estis anoncita, ke la libro de Nikolao Gudskov "Origino de la vivo sur la Tero" gajnis la 3-an lokon en la Premio por la plej bonaj sciencaj verkoj en 2010-2015 en Esperanto. La premio



estis fondita de AIS.

Nepre menciindas, ke la unuan premion Germain Pirlot ricevis Tatjana Auderskaja el Odeso pro la libro "Vivo en gutto da akvo" (kies scienca redaktoro, cetere, estis ankaŭ N. Gudskov). Ambaŭ sciencpopularaj libroj estis eldonitaj en la moskva eldonejo "Impeto" en la serio "Familia biblioteko".

S-roj Mitin, Melnikov kaj Gudskov nun estas estraranoj de REU – do, la movadanoj bone okupiĝas ankaŭ pri evoluigo de la verda kulturo!

## Informo el Volgogrado

Jam dum kelkaj jaroj nia, iĝinta malmultnombra, klubo "Espero" ĉiujare organizas ion por loĝantoj de la suda urba regiono.

Ses fojojn ĉe ni estis Festivaloj de slavaj lingvoj, kiujn ni faris en diversaj lernejoj. Kvin fojojn ni organizis ekspoziciojn pri Esperanto okaze de la "Tago de distrikto" aŭ "Nokto en muzeo" kaj "Tago de bibliotekisto"

Anta u la 4-an de novembro (Festo de sendependado) ni trioble por 7-8-klasanoj faris kvizojn en la testa formo: "Ĉu vi bone scias historion kaj kulturon de Rusio?" Gelernantoj respondis skribe. Tuj post la fino, mi anoncis verajn respondojn kun komentoj. Samtempe Ludmila Bykova sukcesas tralegi respondojn kaj anoncis gajnantojn.

Sep fojojn ni ŝakludis. Pri tio mi rakontos pli detale, eble iu uzos nian metodon. Dum kvin unuaj turniroj ludis po 10-12 plenaĝuloj kaj 12-15 gelernantoj. Inter ili ludis 3-5 esperantistoj. Sed, bedaŭrinde, lastaj du turniroj pasis sen viroj. Turnirojn ni faras en lernoĉambro de muzeo "Staraja Sarepta" aŭ en sportlernejo, kie laboras kiel trejnisto de ŝaka fako Galina Lebedeva. Ŝi estis juĝanto de ĉiuj sep turniroj. Gejunuloj ludas laŭ la svisa sistemo, rapide, nur dimanĉe. Plenaĝuloj longe pensas, ne volas malgajni, ludas malrapide dimanĉe kaj sabate. Ĉiuj kun ĉiuj. Nur ĉijare ses virinoj sukcesis dum unu tago ludi po 5 ludoj! Imagu, aĝo de ludantinoj estis 60-75 jaroj. Helpis elteni tian ŝarĝon teo kun dolĉaj kukoj dum paŭzo. Kaj kantoj! Kvar el ses dum multaj jaroj kantas en korusoj de veteranoj.

Junularajn turnirojn ni ĉiam komencas per iu konversacio aŭ kvizo dum 8-10 minutoj. Finiĝas turniroj per elmanigo de venkatestoj kaj disdono de gajnaĵoj de sendependa loterio. La infanoj atendas tiun ĉi turniron des pli, ke pri ili en lokaj ĵurnaloj oni publikigas artikolojn kun iliaj fotoj.

**Valentina Spicina**

**Nia kulturo**

## **NI FARU NIAN POEZION VERE INTERNACIA**

Dum la 6-a Moskva Esperanto-Renkontiĝo, okazinta apud Moskvo la 9-11-an de septembro ĉi jara, mi prezentis mian prelegon pri la temo "Ĉu estas la Esperanto-poezio internacia". Ĉefaj tezoj de mia koncepto estas jenaj:

- Universaleco de Esperanto apriorie ebligas internaciigon de la Esperanto-poezio, ties integriĝon en la mondan, tuthomaran literaturon. Tamen pro la eksterlingvaj kaŭzoj tiu integriĝo ne okazas en la necesaj skaloj, ĉar ĝin bremsas memizoliga sinteno de la monda E-komunumo kaj ĝiaj diverslandaj fakoj, pro kio la E-poezio funkcias nur en lingvaj kaj kulturaj kadroj de sole esperantofona komunumo sen reciprokaj inteligoj kun la etnalingvaj literaturoj kaj kulturoj.
- Tio esprimiĝas en precipe unuflankaj tradukado de poeziaĵoj el la etnaj lingvoj en Esperanton sen traduki kaj publikigi la originalajn Esperantajn poeziajn verkojn en la diversajn etnajn lingvojn.
- Por korekti tian situacion necesas ŝanĝi lingvokulturaran politikon de la E-komunumo: pliakcenti la interlingvajn kaj interkulturajn ligojn kun la neesperantista mondo, vaste uzi la etnajn lingvojn kiel efektivan rimedon por diskonigo de literaturaj verkoj, kreataj en Esperanto. Tio ebligos montri al la neesperantofonoj enhavajn kaj estetikajn valorojn de Esperanto, ĝian eblecon ludi rolon de internacia kulturigilo.

Precipe malkontentige status ĉi-direkta agado en Rusio. Eblas rememori nur kelkajn publikigitajn tradukojn de la originalaj E-poemoj en la rusan lingvon. Mi opinias, ke venis tempo intensigi tiun ĉi laboron en nia lando – grandare krei kaj publikigadi ruslingvajn tradukojn de la plej bonaj originalaj E-poeziaĵoj. Kiel la plej grava celo estu estonta eldono de Antologio de Esperanto-poezio en la rusa lingvo.

Por efektiviĝi tiun ĉi taskon mi proponas krei laborgrupon el la kapablaj rusofonaj esperantistoj, kiuj pretas okupiĝi pri ĉi-speca tradukado.

Por komenco mi proponas al ĉiuj dezirantoj provi traduki en la rusan lingvon la mallongan poemon de Julio Baghy «Aŭtuna foliaro» kaj sendi viajn variantojn en la redakcion de la Bulteno:

Foliaro, flirte danca,  
en koloroj centnuanca,  
prujnmordite ventpelate  
ŝvebas ĉie : kampe, strate ;  
jen kuniĝas, jen dissaltas,  
tie sinkas, tie haltas  
por susuri, sible plendi,  
jen funebre por silenti,  
poste supren, ek pro blovo,  
sed sencele kaj sen povo  
ĝis ĝi ĉesas kirlle krozi  
kaj ariĝas por ripozi,  
kuŝi kiel morta garbo  
sub soleca seka arbo.

*Ludmila Novikova*

## *Mencioj pri Esperanto*

### Ĉina rilato al Esperanto

Nun en Rusio finfine aperis romano de la ĉina verkisto Liu Cixin (劉慈欣, Лю Цысинь) "La tri-korpa problemo" (三体, Задача трёх тел) - dume, kiel mi scias, nur elektronikforme (vd. ĉe <https://flibusta.is/b/441861>). La romano, i.a., ricevis en Usono tre prestiĝan premion *Hugo Award*, kio estas eksterordinara evento por eksterusone verkita libro. Sed jen kio gravas por ni. En la romano temas, i.a., pri tio, ke dum la Kultura revolucio en Ĉinio kvazaŭ ekzistis programo de serĉado de eksterteraj civilizoj, en kadroj de kio ekzistis projekto pri sendo de mesaĝo al supozataj eksterteranoj. Do, en tiu projekto estis teksto al ili sendota, kaj estas skribite: eblaj lingvoj: la ĉina kaj Esperanto.

Do, en imago de moderna ĉina verkisto la ĉinaj potencoj eĉ en terura periodo de la Kultura revolucio sufiĉe sciis pri Esperanto kaj agnoskis ĝian rolon kiel perfekta komunhoma lingvo. Ĝojigas!..

*Nikolao Gudskov*

### Neatendita pozitiva mencio



Laŭ atentigo de *Boris Kolker*, en la paĝaro "Slava kulturo" (<http://slavyanskaya-kultura.ru/slavic/linguistics/-prosto-kak-apelsin-samye-legkie-inostrannye-jazyki-dlja-izuĉeniija.html>) aperis artikolo

"Просто как апельсин!" Самые легкие иностранные языки для изучения ("Simpla kiel oranĝo!") La plej facilaj lingvoj por studado) kun neatendible pozitiva mencio pri Esperanto, eĉ kun aludo, ke ĝi povus esti la plej bona solvo de la lingva problemo en EU! Tre utila artikolo por

propagandaj prelegoj kaj konversacioj. La anonima aŭtoro verkis la artikolon surbaze de iu artikolo de František Langer en <http://www.multikulti.ru/>.

---

**La Bulteno de REU (BdR) atendas viajn lokajn, regionajn novaĵojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov [nikolao@yandex.ru](mailto:nikolao@yandex.ru) aŭ (kaj) Svetlana Smetanina [svsmetanina@yandex.ru](mailto:svsmetanina@yandex.ru)**

*Estraro de Rusia Esperantista Unio*

Redaktofino 12.10.2016